

MI, VAGABONDO

(D. Dattoli/A. Salerno)

Esperantigo: E. Rovere (Manŭel)

Mi plenkreskos iun tagon, la ĉielon de la vivo mi flugtuŝos.

Sed, infano, mi ne konis, ke ne ĉian realiĝas niaj revoj.

Poste mi ekiris mian vojon dum vesper'.

Venteto tra l'hararo, survizaĝe la brileto de la steloj;

tuj malaperis hejmo mia kaj la infano, kiu ludadis en ĝardeno.

Mi, vagabondo estas mi, vagabondo kaj nenio alia,

kun senmona poŝo mia, tamen min akompanas Dio.

Jes, la mondo min allogas, sed urbegoj al mi ŝajnas senanimaj.

La tempo memorojn miajn forviŝas, sed pri mia familio tute ne.

Poste mi vekigis dun decembra sunleviĝ',

la fajro de kameno plivarmigas ol la suno de l'mateno:

sopiris mi al hejmo mia, tamen restas mi perdita tra la mondo.

Mi, vagabondo estas mi, vagabondo kaj nenio alia,

kun senmona poŝo mia, tamen min akompanas Dio.

Vagabondo, civitano de la mondo!

Esperantisto, ne kuracebla idealisto!